

# SVISA ESPERANTO - SOCIETO

## INFORMAS

N-ro 1/1997

JANUARO-FEBRUARO

### SES-KOTIZOJ/ABONOJ 1997, alvoko de la kasisto

En tiu-ĉi eldono de SES-INFORMAS vi trovas kiel kutime enpagilon (653677-40) por pagi vian kotizon aŭ abonon por 1997. Mi afable petas ke vi faru tion ne pli malfrue ol fine de junio 1997!

La sama enpagilo servas ankaŭ por donacoj; ankaŭ tiaj estas ĉiam bonvenaj. Sed ne uzu ĝin por Agado 2003!

Bonvolu nepre ĉiam indiki sur la enpagilo kion vi pagas, do ekzemple:

"Kotizo 1997", aŭ "Abono 1997", aŭ "Donaco"

La KOTIZOJ INKLUZIVAS abonon al LITERATURA FOIRO LF kaj SES-INFORMAS SI:

	CHF
Infanoj ĝis 18 jaroj	12.-
Gejunuloj ĝis 26 jaroj	45.-
Ceteraj membroj	70.-
Geedzoj	100.-
Emeritoj, pensiuloj	45.-
Geedzoj emeritaj	65.-
Dumvivaj membroj	1400.-
Dumvivaj membroj emeritaj	900.-
-----	
Abono al SI sen membreco	45.-

Tutkoran dankon por baldaŭa pago!

Ernst von MAY

## RERIGARDO AL LA PASINTA JARO 1996

Denove la jaro pasis kaj rerigardo al la pasintaj 12 monatoj estas kutimo. Nia informilo "SES INFORMAS" regule tiel aperis, ke ĉiu leganto ricevis ĝin fine de 1 monato aŭ plej malfrue je la 1-a de la oficiala eldonmonato. Mi estas kontenta ke eblis tio. Al ĉiuj, kiuj kontribuis, apartenas kora danko. Domaĝe estas, ke ne ĉiujoje ĉiuj grupoj sendas siajn informojn. Tamen, ĝenerale vidite mi estas kontenta pri la kunlaboro.

Sur 84 paĝoj mi klopodis doni bonajn kaj interesajn artikolojn, kvankam tio ne estas ĉiam facila. Okazas kelkfoje, ke mi devas esti severa pri decido ĉu teksto valoras aŭ ne. Precipe se mi ricevas politikajn artikolojn, mi ne publikigas, ĉar la informilo ja devas resti neŭtrala. Do vi vidas, ke ne estas ĉiam facile.

Dum la jaro mi ricevis diversajn opiniojn pri "SES INFORMAS" kaj ĉiuj estis pozitivaj. Koran dankon.

En 1997 estos 6 jaroj, dum kiuj mi prizorgis la plenan eldonon de nia informilo. Oficiale mi nun demisiis kaj mi esperas, ke nova redaktoro same klopodos, ke ni havu "SES INFORMAS" ankaŭ en la estontaj jaroj.


Finfine mi deziras al ĉiuj agrablan kaj feliĉan novan jaron. -FL-

oo0oo

### FAMILIOJ SERĈATAJ:


Kie troviĝas Esperanto-familioj kun infanoj en Svislando??

La celo estas: Por fondo de rondo familia ni serĉas gesamideanojn. Direktu vin al Paĉjo Dieter Rooke kaj filo Ciril 7-jara, Aeussere Klus 2, 4702 Oensingen. -DR-



13-a  
**Printempa  
Semajno  
Internacia**

+  
3-a Printempa Lernejo  
Internacia



28 marto - 4 aprilo 1997

**Duderstadt**

Harc-Montaro, Germanio

Germana Esperanto-Asocio

Kompleta programo ricevebla ĉe la redakcio de  
SES INFORMAS

## ĈE LA DOMPARO

(Kultura Centro Esperantista reviziita)

La kurso pri grafologiode Lucia Benedos allogis min tiom, ke mi decidis pasigi semajnon de miaj ĉi-jaraj ferioj en la Kultura Centro Esperantista en la Chaux-de-Fonds. Mi ne bedaŭris. La kurso estis altnivela, profesie gvidita kaj por mi absolute absorbiga. Aparta specialaĵo estis, trovi la ĝustajn esperantajn fakvortojn, kiuj ofte devis esti ellaboritaj el la itala, la gepatra lingvo de s-ino Benedos, kaj devis kontentigi la diversnaciajn lernantojn.

Mi estis tre kontenta pri la bona miksaĵo de studo kaj ferio, kiu permesis havi liberajn posttagmezojn por ripozi kaj ordigi la multajn notojn.

Kun miksitaj sentoj mi estis ekvojaĝinta, ĉar estis mia unua vizito al tiu malgranda oazo post paŭzo de multaj jaroj. Kiam mi estis lastfoje tie, KCE same konsistis el du domoj kiel nun, sed ili ankoraŭ estis tute apartaj, kaj la granda aventura ideo pri kultura esperanto-centro konsistis el multaj planoj kaj revoj. Grandaj estis miaj surprizo kaj ĝojo, ke la tiamaĵaj revoj pri la kunigo de la du domoj depost longe estas realaĵo, kaj ĉio alia kio okazis inter miaj tiama kaj nuna vizitoj apartenas al la periodo de "Sturm und Drang" de la juna entrepreno. Nun la ŝipo de la Kultura Centro Esperantista kun la helpo de spertaj kapitano kaj maristo navigas en pli trankvilaj akvoj.

Mi konvinkigis ke partopreni ĉe la domparo iu ajn eron de la multflanka programo de la de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds estas agrabla kaj riĉiga sperto. Ĉio, la bela ĵurasa regiono, la afabla akcepto, la puraj komfortaj ĉambroj kaj la bone ekipitaj salonoj provizas al la esperanto socio tre agrablan etoson por kombini klerigadon kun feriado en amikeca rondo.

-Sonja Brun-

## **En kampo de la junularo** **(eta raporto de JES)**

Tutcerte vi scias iom pri Junularo Esperantista Svislanda, sed eble vi ne multon aŭdas pri ĝi. Pro tio ni ĉi tie iom raportas.

Ekde 1990 JES estas aktiva kaj stabila grupo de gejunuloj. Ni havas regulan gazeton por niaj membroj: la Svisa Kanguruo, kiu ĉi-jare iĝis la Alpa Kanguruo kaj aperas kunlabore kun Aŭstria Esperanto-Junularo. Okazas pluraj semajnfinaj renkontiĝoj de JES ĉiujare (skisemajnfino, biciklado, ktp), kaj pli kaj pli da svisaj gejunuloj partoprenas en internaciaj junularaj kongresoj (en Germanio, Italio, sed ankaŭ Rusio, Kanado, Koreio kaj multe pli...). Ekde 1995 eĉ estas svisino en la estraro de TEJO (junulara sekcio de UEA)!

La 23-an de novembro okazis la ĝenerala asembleo de JES, kaj evidentiĝis ke la membroj pli kaj pli engaĝiĝas en la agado. Nova komitato estis elektita kun sep homoj: prezidanto David Pochanke, kasisto Chiara Fabri, sekretario Vera Pochanke, vicsekretario Francisco Ochoa, respondeculo pri renkontiĝoj Claudia Gessler, respondeculo pri eksteraj rilatoj Sarah Siksou kaj Marion Grosjean-Bélisle. Ni havas multajn planojn por venonta jaro, ĉefe en informa kampo. Ni nun havas novajn varbilojn, kaj planas intensive uzi ilin. Kompreneble renkontiĝoj plu okazos, kaj ankaŭ kursoj.

Ni decidis daŭre teni tre malaltan membrotizon (Fr. 20,-), por ne malhelpi al interesatoj havi tiun bazan kontakton kun la esperanto-mondo. Ni kore dankas al ĉiuj patronoj de JES, kiuj afable subtenas nin finance jam de jaroj. Tiu helpo por ni estas nepra, ĉar la kotizoj ne sufiĉas por kovri la bazajn kostojn. Se ankaŭ vi deziras same kontribui al nia esperanto-agado inter

# ★ *Espéranto*

-6-

«Une culture internationale à portée de la main»

«L'idéale deuxième langue pour tous»

«Un événement interculturel»

«La langue phare pour les incondtionnels du voyage»

*Avec le Pasporta Servo: passer la nuit gratuitement  
chez 1000 espérantistes dans le monde entier.*

*Chaque année d'innombrables congrès, séminaires, rencontres...*



Junularo -7-  
Esperantista  
Svislanda

- JES est une association de jeunes jusqu'à 30 ans qui parlent la langue internationale espéranto ou qui soutiennent cette idée: l'espéranto, une deuxième langue pratique, pour tous.

# JES


Jeunesse  
Espérantiste  
Suisse

- Nous communiquons en espéranto par dessus les barrières linguistiques suisses et au-delà des frontières.

- Les membres de JES se retrouvent plusieurs fois par année à différents endroits de Suisse, pour bavarder, faire des excursions, de la musique, des jeux, de la cuisine, regarder les photos des rencontres passées... Une occasion idéale pour les nouveaux espérantistes d'apprendre à connaître dans le milieu la langue et ses «utilisateurs».

Nous faisons ensemble le voyage à certains congrès à l'étranger, comme par exemple le «Séminaire International», en Allemagne.

- Tous les membres reçoivent notre revue «la svisa kanguruo», ainsi que le magazine européen «koncize».



gejunuloj, via helpo estas tre bonvena (ni indikas ĉi tie nian kontonumeron, ĉar ne certas ĉu ni povos enmeti enpagilon: Junularo Esperantista Svislanda, 80-29282-8). Sed pli grave estas por ni via aktiva kunlaboro en la varbado...

En ĉi numero vi trovas varbfolion pri JES. Ĝi disponeblas en la franca kaj la germana lingvo kaj tre bele aspektas, se oni kopias ĝin sur koloran paperon. Vi povas uzi ĝin por disdoni al gejunuloj! Vi ankaŭ povas uzi ĝin por kolekti **pasivajn membrojn**, homojn kiuj nek volas lerni esperanton, nek pagi kotizon, sed tamen konsentas kun nia agado, kaj pretas subskribi tian deklaron (vidu la respondkuponon).

Tiuj pasivaj membroj ne estas tre malsimilaj de membroj de kutima asocio, kiel politika partio aŭ WWF, kie la homoj ne bezonas lerni lingvon: nur konsenti kun la celoj de la asocio. Kaj ili multe helpas al ni en niaj kontaktoj kun aliaj organizoj. Per tiuj kontaktoj ni povas kelkfoje atingi subvenciojn, aŭ pli ĝenerale informi pri esperanto kaj krei ligojn. Vi ankaŭ povas peti ĉe ni ĝeneralajn informilojn pri esperanto, la gramatiko, kaj ankaŭ afiŝojn.

Ni esperas ke la kunlaboro inter la anoj de SES kaj JES plu daŭros, kaj deziras plenan sukceson al la esperanto-movado en Svislando!

Nia adreso: JES, cp 32, 2416 Les Brenets

oo0oo

#### **LASTMOMENTA INFORMO:**

**LA ĜENERALA KUNVENO DE LA SVISA ESPERANTO-SOCIETO okazos la 15-AN DE MARTO 1997.**

Detala informo sekvos en SES INFORMAS numero 2/1997.

oo0oo





Kolora bildkarto de la ESPERANTO-BALONO, eldonita je la 21-a de februaro 1979, dediĉita al la 64-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO 1979 en Luzern. La karto estas ricevebla ĉe la redaktoro de SES INFORMAS, je la speciala prezo de CHF 1.- po ekzemplero. Bv. aldoni al vi afrankitan koverton.

## INTERESAJ KAJ BELAJ FILATELAĴOJ

(unika kaj nekomparebla okazo por filatelistoj kaj geamikoj de Esperanto)

1. En decembro 1979 estis inaŭgurita la unua "Esperantobalono". Okaze de tiu evento ni eldonis memorigan **koverton**, afrankitan per la 90-centima cepelinmarko kaj kun la stampo "aerpoŝto varmaera balono HB-BEO ESPERANTO". La koverto surhavas ankaŭ la koloran bildon de la balono. Mi havas ankoraŭ restkvanton de tiu eldono kaj pretas vendi la kovertojn favorpreze, nome CHF 1.- po ekzemplero.

2. Samtempe estas ankoraŭ havebla la oficiala PTT-koverto, afrankita per la 70-centima marko, surhava la Esperantobalonon kaj belan surpreson, kiun faris la PTT. La eldonto estis la 21.2.79. Ankaŭ tiu koverto estas havebla je CHF 1.- po ekzemplero.

3. Afrankita per la sama stampo ekzistas ankaŭ tre bela bildkarto, afrankita per la oficiala balonmarko de 21.2.79. Tiu memoriga karto estas havebla samloke, je la favora prezo de CHF 1.- . La unika oferto valoras nur ĝis la provizo estas elĉerpita. (Bildo de la karto estas en tiu-ĉi informilo.

Mendojn akceptas F.Liechti, Wiesliacher 17, 8053 Zürich (Bonvolu aldoni al vi afrankitan koverton.)

oo0oo

## KORESPONDPETO

Deziras korespondi kun svisaj instruistoj, kiuj instruas al infanoj Esperanton.

José de J. Campos Pacheco

Pedro Betancourt

Natangas

Cuba 42700

(Li bezonas lernolibrojn kaj infanlibrojn por siaj lernantoj 9-jaraj kaj emus ankaŭ ricevi ĵurnalojn.)

-MG-

## GRUPAJ INFORMOJ

### **BELLINZONA:**

Ni kunvenas ĉiam la 2-an sabaton en Viale Motta 32, 6500 Bellinzona.  
11.1.17.00h kaj 8.2.17.00h.

### **ESPERANTO-SOCIETO BERN:**

La 1-an mardon monate en restoracio al forno, Spitalgasse 37.  
7.1.19.30h kaj 4.2.19.30h

### **ESPERANTORONDO BIELO:**

En restoracio MIGROS, Neumarkt, Bielo 3, ĉiun ĵaŭdon 18.00h - 19.00h.

### **ESPERANTO-SOCIETO "LA STELO" GENEVE:**

**ZAMENHOFA FESTO;** Sabaton la 11-an de januaro 1997 verŝajne en restoracio INTERNATIONAL, Bulvardo Georges-Favon 21. Je la 12-a horo vi estas varme bonvenigataj al kuna tagmanĝo, sekvos festa programo kun lotoludo, kord-instrumenta koncerto kaj kantado.

Rilate al INSTITUT NATIONAL GENEVOIS:

Post la decido de la ĝenerala kunveno, ne plu kunveni en Institut National Genevois, la ekserĉado por nova kunvenejo evidentiĝis nefacila. La komitato decidis okazigi la Monatajn Kunvenojn principe la unuan mardon de ĉiu monato, t.e.

4.2.19.00h kaj 4.3.19.00h.

### **ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:**

6.1.20.00h Monata kunveno: Claude Gacond prelegos pri: "Ĉu Esperanto vere havas 16 gramatikajn regulojn"?

### **LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO/LES:**

En restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr.8 en Emmenbrücke, kun escepto de BIG BEN.

8.1.14.00-16.00h paroliga kunveno en BIG BEN. Gvidos Franz Brügger.

PP  
8053 Zürich

---

La Monata Kunveno okazas ĉiam la 4-an ĵaŭdon de la monato.

23.1.20.00h kaj 27.2.20.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**

Ni kunvenas ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTO-KLUBO WIL:**

En restoracio Schweizerhof, untere Bahnhofstrasse 18.

8.1.20.00h En la loĝejo de familio Lucina kaj Robert Pochanke, Bildfeldstr. 10, 9552 Bronschhofen, tel: 071/911 14 49. -Amatora video-filmo pri 81-a UK en Prago. -

19.2.20.00h En restoracio Schweizerhof, Untere Bahnhofstrasse 18. -Manifesto de Prago kaj pri 52-a TEJO-Kongreso iom gaje rakontos David Pochanke.-

**ESPERANTP-SOCIETO LAUSANNE:**

15.12.14.30h ZAMENHOFA FESTO en la biblioteka salono de la restoracio LE DELTA, Place neuve 3, 1009 Pully. Telefona aliĝo: 021/729 58 02.

---

Limdato por kontribuajoj al SES INFORMAS 2/97 estas la 4-a de februaro 1997.

---

**Red-Adreso: Fritz Liechti Wiesliacher 17**  
**8053 Zürich. Tel: 01/381 77 13**